

la naska fasko

La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Numero dek kvin
2009-07-17
vendredo



Ĉu vi maltrafis pasintajn numerojn de la Fasko? Ĉiuj estas haveblaj en nia ret-arĥivo:

<http://esperanto.org/nask>

Abeloj abundas (2-a strofo)

de Doroteo HOLLAND

Kolibro simile
Serĉas frandaĵojn,
Sed pli alte;
Kaj kontentas
Silente.

Trovi NASK-on kaj sencon por miaj aventuroj ĉe UCSD

de Ina CENTAUR

Mi eksciis pri NASK de trampo (homo sen domo).

Sed ĉi tio ne estas rakonto pri fizikisto kiu subite fariĝis tibeta monaĥo. Efektive, eble la ĉefa afero kiu mankas al ĉi tiu rakonto estas decidiga finaĵo.

La afero komenciĝis antaŭ sep semajnoj en varmeta kaj zefira tago en malfrua Majo, kiam mi hazarde estis leganta Esperan-

to-lernolibron de RICHARDSON, uzante publikan transporton. Oldulinaĉo vestita en ĉifonoj, emananta la odoron de miriado da noktoj ekstere en la stratoj, sidiĝis en la seĝo apud mia seĝo kaj diris al mi ke la sola vojo per kiu mi povus lerni Esperanton estus per NASK en Sanfrancisko. Mi ne memoras precize kion ŝi diris (eble la tuta konversacio estis en Esperanto), sed estis intenseco en ŝi, kiu kaj timigis min kaj konvinkis min pasigi tri semajnojn en la somero lernante Esperanton.

Guglinte pri NASK post tiu renkonto, mi trovis ke anstataŭ en Sanfrancisko, NASK estis efektive en Sandiego—kaj ne ie ajn en Sandiego, sed efektive en universitato kie mi jam havis multan “historion”—jen, UCSD. Ĉi tie principe estas la lasta loko kie mi volas esti. Sed mi jam decidis ke mi iros al NASK, kaj mi trovis ke mia decido plifortiĝis—malgraŭ la fakto ke ĝi estas ĉe UCSD.

Antaŭ sep jaroj mi eniris *Sixth College* de UCSD kiel ambicia kaj freneza unuajarulo kun triobla ĉefstudo de bio-inĝenierarto, fiziko kaj filozofio. Antaŭ tri jaroj, post akirado de pli ol tricent kreditoj kaj finlaborante la kernajn postdiplomajn kursojn en fiziko, mi jam havis pli ol sufiĉe de la politiko de akademio, kaj mi foriris la universitaton por esti artisto.

UCSD, por mi, resonas variadojn de la temo de senluziiziĝo.

Promenante tra ĉi tiu universitato, mi ofte renkontas specialajn lokojn kiuj elvokas

multsensajn memorojn el mia “obskura estinteco” kiun mikso de naiva konstato kaj samtempeco devigis min fronti. Por la unuaj du semajnoj de NASK, mi penis ignori tiujn fantomojn, konvinki min ke mi estis ĉi tie nur por Esperanto, kaj nenio alia. Sed, preskaŭ kie ajn mi iris, mi estis hantita de memoroj kiuj ŝajnis kiel io el antaŭa vivo—promenante en spontaneajn festojn en la inĝenieraj komputilejoj, verkante silentajn epopeojn per skribaĉoj en la ŝtuparoj de *Muir College*, forkurante al tiu sekreta loko kie mi unufoje kisis virinon. Ĉi tiu miasmo de memoroj ĝis afero kiun mi ne povus eviti.

Mi ekstudis Esperanton post legado de la romano *La Alĥemiisto* de Paulo COELHO. En tiu romano, Esperanto estis enkonduki-ta en ĉirkaŭaĵo de preterlingvo (kaj tiel ke Esperanto ŝajnis mistera kaj mistikisma), sed ĝi estis precipe rakonto pri ŝafisto kiu (sekvante la konsilon de la trampo) iris en vojaĝo-aventuron por trovi ke lia “persona trezoro” estas efektive pli proksima al hejmo ol li jam pensis. Timeme kaj sen iu efektiva efiko, mi jam pensi fari la unuan paŝojn por reguligi ĉi tiun malfinitan aferon el mia pasinteco. Sed, ju pli mi streĉiĝas pri fini la aferon, des pli mi konvinkiĝas ke ĝi estos senkonsekvencia.

Estas nur kelkaj aferoj kiujn oni povas ricevi el lernejo, kaj kvankam mi ĉiam estos dankema al UCSD pro tio, ke ĝi donis al mi guston de sistemoj kaj politikoj kiel partopreninto, mi jam faris mian decidon antaŭ tri jaroj.

Kaj do, ĉi tio estas simple rakonto pri kiel mi eksciis pri NASK de trampo, kaj ĝis certa pri mia vojaĝo laŭ vojo malpli ofte sekvata.

Estas mi NASKano

de Niko KALIVODA

Kuŝas mi en dom’ Asante
Literaturon ĉiam studante.
Krokodilu nur satano,
Estas mi NASKano.

Brutalismo min katenas
Sed ne tro ĝi min ĉagrenas.
Tiel la vivo por APM-ano
Estas mi NASKano.

En la mano, ne sur bretaro,
Restas mia SAT-vortaro.
Mi preskaŭ estas vortarano,
Estas mi NASKano.

Gramatikon mi nun konas
Kaj Naskan Faskon ja abonas.
Librojn legu ĉiu kursano.
Estas mi NASKano.

Mi parolas ĉiutage
Kun Esperanto enezofage.
Vortoj fluas kiel de fontano,
Estas mi NASKano.

Pionirojn mi adoras,
Pri siaj verkoj ĉiam laboras.
Deklamas mi de la Korano
Estas mi NASKano.

Vivas per facila vento
Mi ĉi tie, feliĉa studento.
Ĉio bonas krom malvarma krano;
estas mi NASKano.

Post la mort’ ĉe tombo mia
Staros “rondo familia,”
Revenos memoroj de l’ oceano
Ĉar estas mi NASKano.